

Hermann Allmers,
Kampa soleco

tradukita de Manfred Retzlaff

Ripozas mi en alta verda gres'
Kaj sendas longan vidon al-etere,
La griloj ĉirpas ĉirkau mi sen ĉes',
Ĉirkaŭas min ĉiela blu' mistere.

Kaj belaj, blankaj nuboj iras jen
En la bluego kiel songoj belaj;
Mi kvazaŭ jam mortinte ŝvebas en
Eternaj kaj trankvilaj spacoj helaj.

*Traduko de la Germana poemo "Feldeinsamkeit" de HERMANN ALLMERS (*1840-02-01 – †1902-03-09) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-650-1309 (2012-12-18 22:34:38)

Pri la poeto vidu la retejojn http://www.hermann-allmers.de/wer_ist_hermann_allmers.php kaj http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_Allmers.